

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protoktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburĝ
Ernest Archdeacon, Paris
I. Gilli Nort, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 203
3. 8. 1924

Redakcio:

Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,20 sv. fk. por landoj, kies valuto
sufiĉas maksimume 50%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrat-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fk.),
ĉe „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburĝ, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Al niaj legantoj!

Respondante al multaj demandoj ni sciigas per tio, ke ET ne aperos dum la Deksesa en Wien kiel en pasinta jaro en Nürnberg.

La L. K. K. bedaŭrinde ignoris nian tiurilatitan proponon.

La venontaj du numeroj de ET plejparte enhavos la raportojn pri la Deksesa. ET 204 verŝajne povos raportoj pri la 3 unuaj tagoj, dume ET 205 informos pri la sekvantaj okazontoj.

Pro teknikaj kaŭzoj ambaŭ numeroj estos ekspedataj kune.

Por fakraportoj ni rezervigos ĉiun disponeblan lokon.

Kongres-sekretarioj

sendu tuj siajn raportojn aŭ prefere havigu ilin tuj al nia ĉefredaktoro s-o Teo Jung laŭ poŝtadreso de l' Deksesa.

Ĉar dum la Deksesa niaj direktantoj ne estas hejme ni petas paciencon pro eventualaj korespondadoj.

La administrado simple funkciados.

Redakcio kaj administracio de ET.

Al Wien.

Por la studenta fakunsido

dum la Deksesa la redaktoro de la Wiener universitato s-o J. Döllner prenis sur sin la honorprezidantecon. La kunsido okazos kun riĉa programo. Krom organizaĵoj kaj propagandaj demandoj estas preparolataj sciencaj kaj studentaj temoj. Kolegoj, kiuj deziras fari referaton dum la konferenco estas petataj, tuj sendi la temon al la aranĝanto s-o A. Mildwurf, Wien XVI, Thaliastrasse 12.

Wiener Akademie Societo Esperantista,
E. Sonnenfeld, sekretario.

IX. Itala Nacia Esperanto-Kongreso

via Bertholler 31, Torino 6 (It.)

Sinjoro D-o Umberto Toschi, ĝeneralsekretario de FEL sciigas nin lastminute: Ordonfolio n-o 22 de la 15 julio 1924 de Gen. Direkto de la Ŝtataj Fervojoj Italaj enhavas decidon n-o 395 komo C la koncedon de fervoja rabato al Wien de ĉiu partoprenanto al la Universala Kongreso, kiu eliras kaj revenas resp. de kaj al unu itala stacio. Permesate estas eliro kaj reiro tra diversaj punktoj de la ŝtatlino kun Aŭstrio. Tempolimo por iro 1 ĝis 14 aŭgusto, por reveno de 6 al 20 sammonate.

Socia Vivo.

Provoj por libera laborkomunumo.

P. N. Stajnov.

El la bulgara lingvo tradukita de Dimitr. Feuer.
Fino (komp. ET 196).

La celoj de tiu ĉi komunista organizaĵo estas formulitaj en la kongreso de 1906:

„Kiel celoj de la komunuma vivo decas esti konsiderataj: 1. la spirita komuneco, bonemo ĝenerala de l' homoj, en kio oni komprenas la alian noblecon kaj 2. la materia bonstato.“ En tiu ĉi difino klare elmontriĝas la direkto, t. e. preskaŭ forlaso de la antaŭa religia asketismo (pli true la duhoboroj diferencis per tre granda dozo da asketismo kaj misticismo). Tiukaze Tugan-Baranovsky faras konkludon: „La duhoboroj aperas ne nur homoj fortaj en la moralaj interesoj, sed same en la praktika regiono, de tie ĉi same ne fremdaj al ekonomiaj celadoj. Ĉio ĉi eksterordinare pligrandigas la socian signifon de la duhobora komunumo, en kiu oni devas vidi ne nur religie-moralecan komunumon, sed samtempe (ĉe antaŭ ĉio) organizaĵon kun socie-ekonomiaj taskoj — kreo de komunista-socia ordo.“

Karakteriza por la duhoboroj estas ilia volo, kiu devenas de ilia profunda kredo pri la vereco de ilia doktrino. Ilia religia koncepto entenas tre

malmulte da mistikaj elementoj: la duhoboroj refutas la religiajn ritojn, ili havas nenian pastraron. Ilia spirita intereso, skribas Tugan-Baranovski, estas ne en la religia misticismo, sed en la konformigo de la praktika vivo laŭ la kristanisma moralo, deklara kiel fundamentan leĝon de l' vivo la amon inter la homoj. Tial ili malaprobas ĉiujn vivoformojn, neharmoniajn kun la leĝo de la frata amo. Ili estas ne nur komunistoj, sed same plej kuragaĵoj anarkiistoj, anarkiistoj pacaj, refutantaj kiam ajn perforton. La ŝtato laŭ ili estas malbono, kaj ĝi devas esti ruinigata per rifuzo de oboe al ĝi. La anarkiismo de l' duhoboroj kaŭzas la konfliktojn — ne nur kun la kruda kaj despoteca aŭtoritato, kiel tiu de la antaŭa rusa registaro, sed same kun la humana kaj liberala, enplene favora al la duhoboroj kanada aŭtoritato. Kaj tio estas tre komprenebla, ĉar eĉ la plej liberala registaro ne povas esti komparebla kun la anarkia sociordo.“

Pri tiu ĉi idea sinsekveco de l' duhoboroj klare parolas la fakto, ke kiam foje metitaj antaŭ la dilemo: ĉu deklari sin anglaj regnanoj, ĉu ili ricevis de l' kanada registaro terojn, ĉu redoni ĉi tiujn dum 7 jaroj prilaboritajn terojn kaj transloĝigi aliloken — ili elektis la duan, kvankam la unua unuavide ŝajnis nur plenumo de formalajo. En la jaro 1907 ili aĉetis unu regionon en Kolumbio, ĉe kio, laŭ la farita konto, ili perdis 10 milionojn da dolaroj. Sed tio ne povis ilin ruinigi, ĉar la duhobora komunumo estis jam sufiĉe konfirmigita, por speri ĉi tiun perdon. En la nova logiko, dank' al la pli bona klimato, ili plantis grandegajn spacojn per fruktaroj.

„En la jaro 1917 — laŭ la komunikaĵo de J. M. Tregubov — la duhobora komunumo disponis pri la jena terposedaĵo: en la regiono Saskaĉevan 12 427 akrojn, en Kolumbio 19 114 akrojn, en la provinco de Princo Alberto 11 196 akrojn. La komunumo posedas multan vivan inventaron — multajn centojn da ĉevaloj kaj ĉiaj

brutoj, vaporplugilojn, lokomobilojn, draŝmaŝinojn elevatorojn, kahel-, cement- kaj tabullaborejojn vapormuelejojn k. a., k. a. En Kolumbio la komunumo plantis pli ol 200 mil fruktarbetojn kaj en la jaro 1916 vendis konservitajn kaj brogitajn fruktojn je 70 vagonoj. La seĝmaŝinoj laboras ne nur por la bezonoj de l' komunumo, sed same por vendado, kaj ankaŭ la kahellaborejoj. Ĉiu laboro estas funkcigata per vaporforto, ekskluzive servata de la membroj de l' komunumo, sen la helpo de dungita laboro.“

La ĉi tuta komplikita komunista vivo surprizas ĉiujn vizitantojn, ĉiujn gastojn, irintajn certigi pri la vereco de ĉi unua laŭ sia speco komunista organizaĵo. P. J. Birjukov alreĝistras ĝin al unu el la unuaj socialistaj organizaĵoj de plej pura speco: Ĝi ne povas esti nomata komunumo. Ĝi estas iom pli. Tio estas jam komunista socio kaj ja ne laŭ fizionomia de la ŝtata komunismo, perforta en sia senco, sed plej libera komunismo de anarkiista speco. La duhoboroj aperas la sola en la dudeka jarcento socia grupo, kiu ne apartenas al iu ŝtato. Ili paŝis trans la ŝtatecon kaj nun vivas en libera anarkia sociordo.“

Per kio esprimiĝas ilia socia vivo? Kvankam ne malmultaj laŭnombre (10 000 personoj), sed inter ili ekzistas nenio simila al registara aŭtoritato. La reprezentantoj de la duhoboroj vilaĝoj kunvenantaj por komunaj konferencoj ne havas ian devigan aŭtoritatan super siaj fratoj, kiuj estas ĉiuj naive egalaj unu al alia. Neniam elementoj de deviga aŭtoritato en la duhobora socio ekzistas: Verigin, kiu per sia kulturo, sciigo kaj organiza lerteco alportis multon por la ordigo de l' komunumo, ne nur ne estas kia ajn prezidanto ktp., sed eĉ ne okupas ian definitan socian oficon.

Ĉe la duhoboroj tiel same mankas kia ajn organizaĵo, rememoriganta de si mem la nuntempajn juĝejon. En sia medio la duhoboroj bezonas neniam juĝejon kaj malliberejojn, ĉar neniu el ili foje faras krimojn. La duhobora socio estas superanta la juĝejon, kaj la lasta de si mem, kiel nebezona socia organo, malaperis.“

Tia estas maldetale tiu ĉi homa kunvizado. Ĝi estas fondita ne per la efkoj de laj eksteraj de la homo kaŭzoj, sed per celado al unusonigo de la ideoj pri egaleco, solidareco kaj amo kun la vivo mem. La duhoboroj ne estas homoj faŭntaj de l' ĉielo. Tio estas la samaj hodiaŭaj homoj, sed kiuj tamen estas plenaj de unu nova kompreno de la vivo, kiuj decidis ordigi sian vivon konforme al tiuj ĉi komprenoj. Per sia ekzemplo ili venas refuti la malverajn asertojn de interesataj en tio homoj kaj same la antaŭjuĝojn de la malkleruloj, ke sen perforto kaj privata posedado la vivo pereos, aperos „anarkio“. La duhoboroj provis, ke tiu ĉi anarkio estas ne nur nedanĝera, sed male, ĝi sola donas veran bonstaton kaj liberecon. Sed ili montras same ion alian: ke por vivi en libereco kaj bonstato, la homoj devas konscii antaŭ ĉio la neceson ilian. Nova mondo ne povas esti donacata, — ĝi estas kreata de tiuj, kiuj forlasis la malnovan, kaj kiuj estas kapablaj ekvivi konforme al siaj ideoj. Tion instruas al ni unu celanta al vere libera kaj bela vivo komunista komunumo.

* T-Bar. „En serĉoj de l' nova mondo“, p. 82.

** Tie, p. 87.

*** Same tie, p. 87—88.

Scienco.

Fiziko.

Nickerson,

la amerika inventisto, disĉipulo de Edison, antaŭ nelonge mortis. Li unue senaerigis elektrajn lampojn, eltrovis la nun ĉi uzatan kontakton por estigo kaj malesigo de elektrika lumo, konstruis la unuan aŭtomatan lifton kaj en la lasta tempo akirigilon por razklingoj.

J. M.

Aktuala politiko.



S-o Macdonald (angla ĉefministro), s-o Herriot (franca ĉefministro) kaj s-o Theunis (belga ĉefministro) en konversacio.

La monato Julio estas en la signo de gravaj politikaj okazantaĵoj.

En London kunvenas ŝtatistoj de Anglujo, Belgujo kaj Francujo kun kompetentaj politikistoj, bankistoj kontinentaj kaj usonaj por finance certigi la mondpacon per realigo de la Dawes-projekto. Kiam eliras nia hodiaŭa numero la situacio ne jam estas klara. Sed la traktadoj antaŭvidigas, ke la partopreno de Germanujo por efektivigo de l' kontraktigo estas certa por la venontaj tagoj.

Ne sole Eŭropo, sed la tuta mondo koncentrigas sian tutan interenson al la konferenco de London, de kies rezultato dependos la plua trankvila disvolvigo de la eŭropa kontinento.

La historio montras poste, ĉu la politikistoj plenumis sian respondecan taskon.

Ni montras en bildo s-on Macdonald (angla ĉefministro) s-on Herriot (franca ĉefministro) kaj s-on Theunis (belga ĉefministro) en konversacio.

R. Kr.

* Tugan-Baranovski — „En serĉoj de l' nova mondo.“

Geologio.

Ekspedicio de la Rusa Scienca Akademio, gvidata de s-o Ferdman, laboras en meza Laplando. Jam estas kunmetita detala karto de meza Laplando. En montaro oni trovis cerkonian mintavalon kaj nekonaŭtajn ĝis nun metalojn kaj mineralojn, kiujn la ekspedicio havigis al la Geologia muzeo en Lenjograd. *P. Pavel, Kiev.*

Historio.

La Pereo de Sodomo kaj Gomorho.

La pereo de Sodomo kaj Gomorho, kiel ĝi estas rakontita en la Biblio, estas la plej malnova naturkatastrofo, al ni konita; ĝi tute ne apartenas en la regiono de l' fabelo, sed bazas sur historiaj faktoj. Laŭ raporto en la ĵurnalo „Ueber Land und Meer“ (Trans Lando kaj maro), la pereo de la du urboj estis sekvo de tiel nomita tektonika tertremo, t. e. tertremo, kiu ne estas kaŭzata pro vulkanaj okazintaĵoj, sed pro la enfalo de kavejgeloj, ellavitaĵ de akvo interne de la tero. En la regiono de l' Jordan-fluejo tiaj ellavadoj kreas grandajn subterajn kavejojn, pleniĝintaj tom post tom per gasoj kiel ankaŭ per asfalt- kaj petroleo-lagoj. La enfalo de l' kaveja plafono liberigis la gasojn, kiuj elĝis tra la estiĝintaj fendoj kaj suprenpremis la petroleon-kaj asfaltamasojn. La gasoj, ekzistantaj ĉefe el sulfhidrika kaj karbhidrika acido ekbruligis pro la premo kaj la forto de la eligo. Ankaŭ fulmoj povas esti kuŝfinkintaj, ĉar tektonikaj tertremoj ofte estas akompanataj de fulmotondroj. La brulanta gaso trovis bonan nutraĵon en la fluidaj petroleoj, asfaltaj ktp.; tiel okazis samtempe kun la tertremo grandega brulado; eksplodoj kaj fumamasoj plenumis la tutan regionon, ekstermante ĉiun vivon. Kiel daton de la katastrofo oni fiksis la jaron 1760 a. K. Laŭ sciigoj de la Biblio la pereo okazis 13 jarojn post la sun-eklipso, menciita en la unua libro de Moseo kaj kalkulita 1763 a. K. Dum la sunmalleviĝo estis malkaŝita al Abraham la naskiĝo de Izraelo, kaj tiu ĉi estis 13 jaraĝa, kiam la urboj malaperis pro Dia juĝo de sur la tero. *Joh. Bernhard, Mlinchen.*

Medicino.

Nova rimedo kontraŭ la beribero.

Depost kelkaj jaroj furcogas en Afriko terura epidemio, malpolipogante grandegajn regionojn. Ne nur la homoj sed ankaŭ la bestoj estas atakitaj de tiu ĉi malsano, precipe la duhufuloj, kiuj estas gravaj por la kulturo de lando. Tiu ĉi epidemio, nomita „Beribero“ ĉe homoj kaj „Nagano“ ĉe bestoj, estas kaŭzita per tripanozomoj kiuj apartenas al la parazitaj grupo de l' protoceoj, al kiuj ankaŭ apartenas la produktantoj de sifiliso kaj malario. La Cece-muŝoj (lat. Glossina morsitans), disvastigas tiujn ĉi parazitojn per iliaj piko. Jam ĉiam oni havis medikamentojn kontraŭ la tripanozomoj: arseno-kaj antimonopreparatoj. Sed ili ne donis definitivan sanigon, garantias nur momentan ŝirmon kontraŭ la infekto. Krom tio la arsenpreparatoj malutilas la vidnervon. La fabriko de farmaciaĵoj kaj farboj Friedr. Bayer kaj Co. en Leverkusen apud Koln (Germanujo) fabrikis mallonge antaŭ la mondmilito novan preparaton kontraŭ la Tripanosomenmalsanoj, nomita „Bayer 205“ aŭ ankaŭ „Germanin“. Ĝi estas pruvite bonega rimedo precipe rilate la homa Tripanosomenmalsano kiuj per ĝi plimultiĝo estas malhelpataj. Per la laborejaj provoj estas konstatita, ke jam per uzo de plej malgrandaj amasoj malgrandaj pruvbestoj estas kuracitaj. Cetere la proporcio de la efikiga dozo al la morigeblo estas ekstrema favora, ekzemple por musoj 1:160. La kuracitaj bestoj estas ankorau kelkajn monatojn poste ŝirmitaj kontraŭ ĉiuj Tripanosomenoj. Por provi la novan rimedon germana komisiono vojaĝis antaŭ du jaroj al Afriko. Laborinte unue kun permeso de la angla kolonia administracio en Nord-Rodezio, poste laŭ invito de la belga guberniestro en Kongostato, ĝi revenis antaŭ kelkaj monatoj. La sanigo de „Bayer 205“ por a homo estas konstatita senkontraŭdire. La plej multaj malsanuloj klarigis post mallonga tempo, ke ili realtingis iliajn antaŭajn potencojn kaj tute resaniĝis. „Bayer 205“ signifas por tio ne nur liberigon por la homoj, kiuj estas malsaniĝintaj per la beribero sed ankaŭ la reakiron de grandaj teritorioj kun elmortonta enlanda popolo por la vivo kaj la ekonomia agado. Rafle la Oksforda biologisto Julian Huxley diris, ke la eltrovo de „Bayer 205“ finance certe estas pli multvalora por la aliancinoj ol la tuta sumo de riparoj. *Hans Dahmen, Horrem b. Koln.*

Tekniko-

Planta oleo por maŝinoj.

En granda kontrasto al supra novaĵo, Childrens' Newspaper, London raportas: Oni timas pro forkonsumiĝo de natura oleo kaj pensas je uzo de planta oleo, kiu povas esti kreskigata. La oleon de la Aŭstralia eŭkalipto oni jam sukcese provis. Tiun ĉi novaĵon ni envicigas al la aliaj kuriozaĵoj. *J. M.*

Granda historia filmo.

Jam de longe estas diskutita en Svislando per filmo kinematografa, kiu devus reprezenti per la

plej verema maniero „la naskigon de la Svisa federacio“. Antaŭ jaro proksimume estis jam fariĝaj la unuaj fotografadoj en la ĉirkaŭaĵoj de la kastelo „Misox“, sub gvidado de s-o Harder, prezidanto de la Sunshine Film, Inc. New York. Post tiuj komenclaboroj la entreprenanto revojaĝis al Ameriko kaj tial jam vekiĝis pensoj pri la malsolvebleco de tiu granda tasko. Antaŭ tagoj nun denove alvenis s-o Harder Svislandon, kaj li nun intencas daŭrigi la laborojn en kantono Uri (unu de la kvar unuaj kantonoj de la federacio). Li jam donis ordonon al du arkitektoj konstrui la necesajn konstruaĵojn. La historie konata vilaĝo Altdorf subite fariĝis filmteritorio. Ĉar la nuna vilaĝo ne plu similas al tiu de la jaro 1291 oni energie laboras je la rekonstruo de antika historia Altdorf. La kastelo „Zwing Uri“ estos rekonstruita. La antaŭ-laboroj bone marŝas kaj oni intencas komenci baldaŭ la filmadon. La filmo promesas fariĝi pompverkaĵo. *G. Höhn, Zürich.*

Sporto.

El historio de ski-sporto en Rusujo.

Laŭ esploradoj de Fr. Nansen la skioj devenas el Centra Siberio, kien en antikva tempo sur Altaĵo kaj Bjalalaj montoj loĝis fino-ugraj gentoj. De tiuj okcidenten nomadantaj popoloj, verŝajne la slavaj gentoj, lernis la uzadon de skioj: Ĉe finnoj ankorau nun la skio estas nedisigebla parto de l' ĉiutaga vivo. Sed la slavoj preskaŭ tute forgesis ĝin. Nur lasttempe ĝia uzado komencas denove pli kaj pli disvastiĝi en Rusujo, precipe dank' al la speciala atento, kiun la registaro dediĉas al tiu moviĝilo tiom grava en la neĝoza, vasta, senvoja lando. *H. F. (Kazan).*

Filatelo.

La filatelo — bona edukilo.

Ĉu ne estas tia opinio vana? Ne, certe ne! Pripensu:

La daŭra okupado per filatelo postulas de ĝiaj anoj pliriĝigon de la geografia kaj historia scioj. — La filatelisto penadas plej eble malkare akiri sian materialon kaj disvendi plej eble bone siajn multoblaĵojn. Per tio li fariĝos bona komercisto, li profitos. La materialo de ĉiu filatelisto devas esti ĉiam pura kaj nedifekta. La filatelisto okupados sian materialon zorgeme kaj atenteme.

Ĉu ne mankas la plimulto de la supre cititaj ecoj al grandparto de nia ĵunularo? Se la filatelo akcelas ĉiujn tiujn bonajn ecojn, ĉu ĝi ne estas bona edukilo? *Fr. Bischof, Wien.*

Saĝo de la poŝtmarkoj, uzataj per afranki oficialajn korespondadojn en Venezuelo.

En Venezuelo oficialaj korespondadoj sendotaj eksterlanden estis, depost 1898, afrankitaj en la poŝtoficejoj per specialaj poŝtmarkoj kun enskribo OFICIAL. La plej nova serio de tiaj poŝtmarkoj estas tiu kreita per Prezidanta Dekreto de la 25 novembro 1910, uzita depost la 28 oktobro 1911 (katalogoj Senf 1923: numeroj 18—22; Scott 1924: numeroj 325—327; Yvert & Tellier 1924: numeroj 20—24).

Antaŭ ĉirkaŭ unu jaro la venezuela poŝto maldaŭrigis la uzon de la menciitaj servo-poŝtmarkoj, afrankante de tiam oficialajn korespondadojn por la eksterlando kun ordinara poŝtmarkoj kies oficiala karaktero estas montrita per traboritaj truo aŭ literoj. Demandite pri la motivo de tiu nova procedo, la ĉefdirektoro de Poŝto de Venezuelo respondis, ke la Internacia Poŝta Konvencio alprenita en Madrid antaŭ kelkaj jaroj kaj aprobita de Venezuelo la 10 julio 1922, malpermesas pluan uzon de specialaj poŝtmarkoj por afranko de oficialaj korespondadoj.

Unue la distinga signo estis truo. Ekzistas kun tiu ĉi truo la sekvantaj valoroj de la serio 1915/22:

- 5 Céntimos, blue verda,
- 10 „ vinruĝa,
- 15 „ brune olivkolora,
- 25 „ vigle ultramaraj,
- 50 „ violetojola,
- 1 Bolívar nigre griza.

Poste la ordinara poŝtmarkoj uzataj oficiale estis distingitaj per traboritaj literoj G. N. (komencaj literoj de „Gobierno Nacional“ = Nacia Registaro). Ili troviĝas sur la poŝtmarkoj multfoje renversaj (N ĉi aŭ N ĉi) sed ankaŭ deokitaj (G. N. | G. N. | G. N.) kaj eĉ mankas sur kelkaj poŝtmarkoj en kelkaj folioj.

Jen listo de la poŝtmarkoj oficialigitaj per traboritaj literoj G. N. (sen punkto post N):

- de la serio 1915/22
- 5 Céntimos blue verda,
- 10 „ vinruĝa,
- 15 „ brune olivkolora,
- 25 „ vigle ultramaraj,
- 50 „ violetojola,
- 1 Bolívar nigre griza;
- de la serio 1923 (Sept)
- 50 Céntimos vigle ultramaraj;
- 5 Céntimos ruĝe bruna,
- 10 „ verda
- 15 „ flave olivkolora,
- 25 „ ultramaraj,
- 50 „ malhele blua,
- 1 Bolívar griza.

La laste nomitaj 6 valoroj (serio 1924) estas nuntempe uzataj.

La konsumo de oficialaj poŝtmarkoj venezuelaj neniam estis granda, ĉar nur korespondadoj oficialaj sendotaj eksterlanden bezonas afrankon per poŝtmarkoj; en la internaj rilatoj sufiĉas stampo sur la koverto aŭ banderolo (poŝtkarto) ne ekzistas). *K. G. Fritsching, Caracas.*

Diversaĵoj.
Kuriozaĵoj.

Rusaj gazetoj komunikas pri morto de 168-jara maljunulo, kiu la lastan tempon loĝis proksime de urbo Polock, ĉe litova limo. Ĝis la morto li ŝparis fizikajn kaj psikajn fortojn. Li naskiĝis en la jaro 1755, servis kiel soldato sub reĝimo Ekaaterino II kaj reĝo Aleksandro I, partoprenis bataladojn ĉe Austerlitz, Fridland, Borodino. Estinte 95-aĝa, li edziĝis trian fojon; vivis kun la edzino preskaŭ 50 jarojn, havante de ŝi tri infanojn. *P. Pavel, Kiev.*

Irlandaj festludoj.

La granda irlanda festo „Aonach Tailteann“ (foiro Tailteann) okazos de la 1 ĝis la 18 aŭgusto, en Dublin.

La festo komenciĝos per orkestra muziko kaj kantado, atletaj paradoj, kaj internaciaj konkursoj en la naciaj ludoj. Inter la multaj fakoj estos piedpilko, naĝado, „huri“-ludo, remado, ŝakludo, enaka „polo“-ludado, kantado kaj deklamado. La ĉefaj loĝantoj, metante flanken religiajn kaj politikajn malkonsentojn unuigas por certigi, ke la festo estu inda je la malnova tradicio.

La famkonata irlanda ĉevalfoiro ĉe Ballsbridge, apud Dublin, okazos en la meza semajno, kaj la festo finiĝos per festeno al konkursantoj kaj eksterlandaj eminentuloj. Mil personoj jam laboras por sukcesigi la aferon kaj konkursantoj sin anoncis el naŭ diversaj landoj. Dublin estos feste ornamata de la Dublinia Rotario-Klubo Specialaj vaporŝipoj vojaĝos al Cove el amerikaj, britaj, kaj eŭropaj marhavenoj. Vizitantoj plezure vidos Irlandon en gaja, festa humoro. La direktoro de la festo estas s-o J. J. Walsh, poŝtestro de la irlanda respubliko. *E. L. Osmond, London.*

La korpo de la aŭtoro de „Quo vadis!“ el Svislando transportata al Polujo.

En Warszawa fondiĝis sisteme komitato organizacia por transporto Polujo la korpon de la antaŭ kelkaj jaroj en Vevey (Svisujo) mortinta fama pola poeto Henryk Sienkiewicz, aŭtoro de la preskaŭ en ĉiuj lingvoj tradukita historia romano „Quo vadis?“. La komitato ricevis antaŭ kelka tempo skribajon de la sindiko de la urbo administracio en Vevey s-o Eugenius Couvreur, ke ekzistas neniaj malhelpoj por fortransporti la kadavron, ripozanta ĝis nun en la kapelo de loka katolika preĝejo. *P. E. S., Bydgoszcz.*

Radio.

Reprezo en nacilingvaj radio-gazetoj nepre rekomendata!

Ukrainio.

Ukrainia Meteorologia Servo favore akceptis la servon de Kievaj esperantistoj por interrilatiĝo kun eksterlandaj kaj prezentis por tio propran radio-stacion kaj oficialan bulleton, en kiu oni malfermas esperantan informfakon.

Por montri taŭgecon de la lingvo internacia oni petas ĉiujn esperantistojn proponi al kiu ajn meteorologia rondo interrilati kun la Meteorologia Servo. La lasta dezirata interŝanĝi proprajn eldonadojn.

Adreso: Kiev (Ukrainio), Kudrjavskaia str. 10 loĝ. 14, al s-o Jozef Skabara. *Poniŝevki, Kiev.*

Finlando.

Ni sciigis, ke la 6. aprilo nunjara s-o Karl Harteva faris radioparoladon en Esperanto de la stacio de Helsingfors, kiun fakton ni registras tie ĉi.

Konsiderante la gravecon por la statistiko kaj la propagando ni petas niajn legantojn sufiĉe frutempe avizi al ni tial aranĝojn.

Statistiko.
Estona gazetaro.

„Esmaspäen“, nun el la plej legataj gazetoj en Estonio, elvenante ĉiulunde en Tallinn (Reval) donas statistikon pri la nombro de l' legataro de estonaj gazetoj kaj ĵurnaloj.

Laŭ tiu statistiko la gazetoj havas: „Esmaspäen“ 60—75 000 da legantoj, „Waba Maa“ 25—35 000, „Däwaleht“ 27—32 000, „Rahwaleht“ (t. n. edziĝa gazeto) 9—13 000, „Postimees“ (en Tartu-Dorpat) 7—10 000, „Töörahw Hääl“ (komunistaj, nun malpermesita) 6—7 500, „Teataja“ 5—7 000, „Kaja“ 5—6 500, Sakala (Fellin) 3—3 500, „Meie Maa“ (Arensburg) ĉ. 3 000 kaj „Oma Maa“ (Fellin) ĉ. 3 000.

El la ĵurnaloj la plej legata estas „Ronk“ (ĵunulara) 16—20 000, „Rumaan“ (nun traduko el alilingvaj literaturoj) 5—7 000, „Odamees“ 4—5 500.

„Agu“ 4-5000, „Noor Töölne“ (organo de l' proletaria junularo) 3-4500, „Rodu“ 3-4000, „Wikerkkaar“ 3-4000, „Meie Lapsed“ 3-5500, „Laste Rööm“ 2-3500, „Tulew Eesit“ (eld. de l' abstinencula ligo) 3-5000.
La plej granda gazeto en Estonio: „Päevaleht“ famen energie protestas kontraŭ statistiko de l' „Waba Maa“, aŝertante ke ĝia legataro sumas 35-45000 kaj tiu de „Esmaspäen“ 32-40000 kaj de „Waba Maa“ nur 15-19000.
Estonia Esperanto-Servo.

Kroniko.

Por aŭri nin legantarojn per ĉiuj aktualaj, fidindaj kaj kompletaj informaroj, ni bezonas sciliojn (sur postkarto aŭ aparta folioleto unuflanke skribita, sed ne inter administral aj privatil sciliojn) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe romo).

Eŭropo. Anglujo.

Londona Esperantista Grupo.

La ĉiujara ekskurso al la famaj Botanikaj Ĝardenoj de Kew okazis sab. 21 junio. Post la ternaĝo, kion partoprenis proks. 150 esperantistoj kaj iliaj amikoj venintaj el multaj partioj, okazis bonega koncerto ĉe kiu kantis la fama kantistino f-lino Rosa Maud. Inter aliaj eroj de la longa kaj interesa programo estis: ŝaradoj de s-o S. J. Smith kaj f-lino H. M. Halliday; reklamoj de la ĝeflido de s-o M. Butler; citosolo de f-lino Fischer. Post elokventaj paroladoj pri la klubo kaj ĝia laboro de s-o Long la prezidanto kaj Boll la sekretario, aliĝis multaj nomaj membroj.

Dimanĉa Rondo.

Projekto establi someran Feri-domon esperantistan preparolis f-lino H. Langellaan dim. 15. junio. Ebligis al esperantistoj kune paŝigi agreblan ferion; antaŭenigi la socialan flankon de la movado kio ne nur entuziasmigos adeptojn, sed ankaŭ allogos en la movadon eksterulojn (multaj personoj ne lernas Esperanton ĉar ili rimarkas la mankadon socialaj aferoj) — ĉi tiu ĉi faras dezirinda la elektilviglo de la projekto, f-lino H. Langellaan estas preta fari sian eblon en la afero.
E. R. Read.

Aŭstrio.

La Salzburga Esperanto Grupo, Salzburg scigas ke la nova klubujo nun troviĝas en hotelo Wolf-Dietrich, Wolf-Dietrichstr. No. 16. Merkrede okazos la ĉiusemajna klubkunveno je 20. hora... Adreso de la grupo ĉe prezidanto R. Grössinger, Elisabethstr. 17, Salzburg.

Ĉeĥoslovakio.

Hranice. Regiona kunveno de nordmoraviaj esperantistoj okazis la 29. 6. en Hranice. Ĉestis ankaŭ samideanoj el Mor. Ostrava, Olomouk kaj Přerov. La programo konsistis el promenaĉkoncerto, laborkunveno kaj akademio. Grandan partoprenon de neesperantistoj montris la koncerto. Regula laborkunveno povis por diversaj kaŭzoj ne okazi kaj oni preparolis la plej necesajn aferojn dum la tagmanĝo kaj poŝtoj.

La akademio malfermis la prezidanto de la societo, kuracisto s-o D-o Levy. Sekvis la tre bele prezentitaj kantoj de virinoj „Svornost“ kaj muziko de s-inoj Chmelářová aŭ Šafárnková el Přerov. Meze de la akademio programo diris la propagandan paroladon „pri neŭtrala lingvo en internaciaj rilatoj“ en ĉeĥa lingvo s-o Prof. Šprinc el Olomouk.
A. Kudela.

Sekve de la propaganda parolado de s-o Prof. Šprinc en aprilo en Olomouk, aranĝis s-o Iermiesch Neuzil ĉe aviadista regimento en majo novan paroladon post kiu li malfermis esp. kurson kun 35 aviadistoj-soldatoj. A. K.

Francujo.

Perpignan. — S-o Vicior Dalbiez, Ministro de la liberigataj regionoj deputito de Orientaj pireneoj s-o Pierre Rameil, raportanto ĉe la Belaria komisiono, deputito de Orientaj pireneoj, s-o Jean Payra, helpprezidanto de la Vinberkultura grupo, deputito de Orientaj pireneoj, akceptis partopreni la Patronecan Komitato de la Franca Societo por la propagando de Esperanto (Paris) kaj de la Amika Rondo (Perpignan).

Ceret. — La 6 julio okazis sukcesa ekskurso al la montero, sub la gvidado de nia fervora samideano Julia.
Rene Lech, ĉefsekretario.

Germanujo.

Chemnitz. Invititaj al la prezidanto de la fondaĵo „Esperanto-Hejmo Göppersdorf“ P. Reuschenbach (Raŭsenbah) inspektis kelkaj gesamideanoj la projektilan por la domo grundon kaj la negocan aferon de la hejmo. La entrepreno prosperas pli kaj pli.

Chemnitz. 1 julio mgnaa kunveno de la Chemnita Esperantistaro en „Arnold's Theatergarten“, bone vizitata. Post vendo de multvalora privata Esperanto biblioteko raportis s-o urba jura konsiliano Feder pri la kongreso en Plauen. Oni denove fiksis la grupkotiŝon. Poste sciigoj kaj debatoj pri antaŭkongreso en Dresden, radioparoladoj, ankaŭ atdebaj en Chemnitz kaj revivigo de „Saksa ligo“ (sciigojn kaj demandojn tiurilate oni direkti al s-o Feder en Chemnitz, Andriŝtr. 41).

Dachau bei München (Oberbayern). Ĉi tie estas fondaĵa lab. Esp. grupo, nombrante 12 da membroj, kiuj ŝu finis la komencintan kurson. Adreso: Paul Späth, Dachau b. München (Oberbayern), Flursŝtr. No. 8 a.

Grünberg (Silezio). — S-o Schols-Zahn gvidas kurson, je kiu partoprenis 8 instruistoj.

Helmsedt, 29. 6. 24 okazis ekskurso kune kun la grupoj Braunschweig kaj Magdeburg. Ĉestis 60 pers. Oni vizitis la kastelon en Marienborn kaj Harbke. Dum la ekskurso, la del. de UEA, s-o Erich Lütj, Helmsiedt, sukcesa varbi 4 novajn membrojn por UEA.

Koblentz. La loka grupo de GEA sukcesis gajni la ĵurnalon Koblenzer General-Anzeiger kaj la pacifistan gazeton „Die Friedensbewegung“ (Bernkastel-Cues) por regula publikigo de la Esperanto-anguloj de Loy.

Köln. La 10. 7. s-o Rob. Kreuz, redaktoro de ET laŭ invito faris propagand-paroladon en Gewerkschaftsbund der Angestellten (Unio de la oficistoj).

Krefeld. Ekskurso dum junio dimanĉo la loka grupo de Krefeld al tiu de Homberg (Niederrhein) al la moneta ĉirkaŭajo (Hülserbruch) de Krefeld, 50 samideanoj ĉestis. Gvidis s-o Loquinghien; s-o Gießmann, Krefeld faris paroladon. S-o rektor Desch, Homberg raportis pri Revelo tag. Ĉar la konitaj ekskursoj sukcesis, oni datriigos ĉiun.

Hispanujo.

Sabadell „Aplech Esperanta Grupo“ 20. 6. finis kurson kun pli ol 200 glerntanoj. S-o S. Sobre. Ankaŭ estis aranĝata la ĉiujara Esperanto kampofesto en arbaro „Vingals“ (Sabadell ĉirkaŭajo) kiam ĉestis pli ol 2000 (du mil) personoj. La festo estis sukcesplena.

Italujo.

Torino. — Oni fondis la Piemontan Instituton de la Itala Katedralo de Esperanto: Gianni Gr. Of. Adv. Giuseppe, Membro de la Reĝa Lerneja Konsilantaro de la Piemonto, direktoro, Ing. De Balzac Marcello, prezidanto de la Torina Esp. asocio, vicdirektoro, s-o Ramollo Franco, prezidanto de la fervojista grupo de Torino, sekr., Ing. Muretti Mario kaj kav. Saccani Berardo, konsilantoj. Adreso de la Sekretariejo: Via Nizza 12, Torino (6).

Torino. En la Radio-Klubo de Torino, Via Carmine 13, s-o Majoro Paccani Kav, Berardo malfermis Esp. kurson por radio-amatoroj. La 26 julio okazos ekzamenoj por la fervojistoj, kiuj partoprenis al lastaj kursoj de Esp.

Litovio.

Merkine (Alita distrikto). Printempe estis aranĝita ekspozicio de esperantistoj ĉe la loka litovia gimnazio. Ĝia direktoro s-o Bakšys ordonis, ke la lita glerntano kolektigu en la tago, difinita por la ekspozicio. Ĉiuj instruistoj ĉestis ĝin. S-o Bakšys malfermis la ekspozicion per longa parolado. La ekspozicio finiĝis per la ludado de la melodio „La Malfrua Somero“, presita en la februara numero de la Revuo, aldonita al la ĵurnalo „Esperanto Triumfonta“ de jaro 1923. La loka kuracisto s-o Kovarskij tre ofte parolas al la ĵurnaloj pri la neceso de Esperanto por ĉiuj homoj. Inter la ĵurnaloj disvastigas Esperanton f-lino Everovici. Inter la geknaboj komencis labori por Esperanto ŝia nevo, dekuŭnura knabo f-linoj. Disvastigi Esperanton inter la aliaj instruistoj promesis instruistino Lejbon.
J. N. Jmudskij.

Novaj efikaj propagandiloj.

Panevezys. — La 1 julio, laŭ la propono kaj iniciato de s-o Prof. Ben-Sahar, la P. E. A. aranĝis sukcesan flortagon kaj kolektis monon por blinduloj. La distrikteŝtato estis la alta protektanto de la flortago. La P. E. A.-anoj vigle laboris kaj ĉiuj urbanoj portadis dum la tuta tago la belajn verdflorajn kaj servis vere belan kaj bonan propagandilon. Vidante la grandegan sukceson kaj profiton ni rekomendas al la tuta mondo samideanaro aranĝi same fojejn jare flortagon je profito de blinduloj (aŭ loka grupo).

Krome, ankaŭ laŭ la propono kaj klopodo de nia fervora s-ano s-o Ben-Sahar la P. E. A. aranĝis lotieron je profito de nia Biblioteko, kiu tre bone sukcesis kaj kunkolektis pli ol 500 lidojn.

Kun bedaŭro ni pensas pri la baldaŭa forveturo de nia kara gasta s-o Prof. Ben-Sahar, kiu helpis nin trege dum la tuta jaro, kaj enviantie ni ekĝojas por tiuj s-anoj al kiuj li nun veturas.
Jozef Tajc.

Nederlando.

Sud-Nederlanda Esperantotago en Bergenpoosum.

La suburbestro oficiale malfermis la kunvenon. Dimanĉo la 15 junio okazis Esperantotago en Bergenpoosum, je bela vetero, sur malnova fortikejo apud la urba parko. Proksimume 200 Esperantistoj kaj ne-Esperantistoj partoprenis inter kiuj 10 el Antverpeno (Belgio) kun ĉi tiu verda standardo. Venis ankaŭ Esperantistoj el Vlissingen, Goes, Dordrecht, Roosendaal kaj Steenbergen. La suburbestro malfermis la kunvenon per belega parolado.

Poste paroladis sinjorino Isbrucker pri „D-o Zamenhof“ kaj pri la interna ideo de Esperanto“, kaj s-o Isbrucker pri la radiokongreso okazinta en Genevo.

Laŭta aplaudado post iliaj elokventaj paroladoj atestis pli bone, ke la ĉestantoj ĝuis. Preĉipe per la pensenta parolado pri „la interna ideo“, sinjorino Isbrucker rikoltis aplaudadon, la aŭskultantoj estis ravitaj.

S-o Holleman dankis la urbestron, la gesinjoroj Isbrucker kaj ĉiuj aliajn per bone elektitaj vortoj. Dume fraŭlino Versyp el Bergenpoosum transdonis florojn al s-o Isbrucker.

Nun la Esperantistoj marŝis tra la urbo al Hotelo antaŭirante de la fraŭlino kun la verda standardo. En la hotelo sinjoro Kanter, 2. prezidanto de la Bergenpoosuma klubo, kaj s-o Jos. Swarf, prezidanto de la Antwerpena klubo, elparolis kelkajn vortojn por laŭdi la aranĝintojn pro la granda sukceso. Sekvo de la propagando estas: fondaĵo de nova klubeto, plejmulte eminentuloj.

Polujo.

Brodnic. Fondiĝis „Esperanto-Klubo“, dank' al sukcesa propagando de s-ano Józef Piechodki. Al la klubo apartenas poloj kaj germanoj.

Bydgoszcz. Plua energia propagando kaj varbado inter ĉi tiuj blinduloj de s-o blindulinsultisto Flonopyński. Ĝus finiĝis kurso kun 30 p. ĉe ĉi tiu ŝtata blindulinsultito.

Lublin. Fine konstituigis ĉi tie filio de Warszawa „Pola Esp. Asocio“ kun s-o Wienskiński kiel prezidanto kaj s-o Cz. Pruski (Przemysłowa 25) kiel sekretario.

Ostrowiec. La 25 junio okazis parolado de Prof. L. Krommberg antaŭ 200 latoristoj. Kurso komenciĝis. Disvendiĝis 200 lermilbroj.

Warszawa. S-o Halkis faris la 5 junio en salono de la studenta-ĥejo lumbild-paroladon pri la „Evoluo de radiotelefonio kaj Esperanto“.

Pola Esperanto Servo, Bydgoszcz.

Warszawa. En junio 4 varsoviaj esperantaj grupoj (Pola Esperanto Asocio, Laboro, Konkordo, Akademia Esperantista Rondo) komencis regulajn kursidojn de reprezentantoj por kuno agado en revivigo de Esp.-movado en Warszawa.

Ak. Esp. R.

Noto, enpresita de s-o Ŝapiro en „Dos naje Lebn“ (Bialystok) pri la kajero de „Revuo“, dediĉita al la juda kaj hebrea literaturo estas represita en la gazetoj „Dos Folk“ (Riga, Latvujujo) kaj „Die naje Zaj“ (Kiŝinev, Rumanujo). Nun la „Juda Telegrafa Agentejo“ (ITA) dissendis tiun noton al la juda gazetaro de la tuta mondo.

Radom. La movadokreska dank' al s-anoj kand. med. J. Rubinstein kaj I. T. Kiliak, kiuj varbas abontojn por ET kaj UEA inter la novaj samideanoj.

Alvoko.

Esperantaj studentoj ĉiulandaj atentu! En septembro de kuranta jaro okazos en Warszawa (Pollando) Internacia Studenta Delegatorkongreso. La Akademia Esperantista Rondo en Warszawa invitas ĉiujn esperantistojn, kiuj troviĝos inter la delegitoj, viziti nian Rondon. Adreso de Rondo: Warszawa, Nowy Swiat 21, tel. 26724. Adreso de Prezidanto: Stanisław Folman, Warszawa, Panska 13 a, telef. 19188.

Ni petas ĉiujn kolegojn demandi informojn pri kongreso je adreso: „Biuro Kongresu Akademickiego“, Centra oficejo de akademioj „Frat'aj Helpoj“, Warszawa, Kopernika 41 (Pollando).
Akademia Esperantista Rondo, Warszawa.

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazontoj) gravaj esp. kunveno, festoj k. s.) s-e n-p a g e.
Aliaj anoncetoj, nur akceptataj por minimume du sinsekvaj impresoj, kolas po du impresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de 0 k BT-numero kontraŭ antaŭa pago. Anoncetoj ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abononto, ĝius por propra anonceto preferan prezon de kvin BT-numeroj. Germano pagos 2.— mk., prefera prezo por postabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

FILATELISTOJ. Profilu antaŭ eldonado de 1925 katalogoj! Ni vendas plej malmultekoste belajn poŝmarkojn: 5 fr. Brusela ekspozicio 1924: po fr. 20; kvarmarka folieto: fr. 70; 5 fr. Montenez: fr. 50; Caritas 1910-1911 plena kolekto: fr. 25; Reĝu kun kasko 1 c. ĝis 50 c. uzitaj: fr. 10, neuzitaj: fr. 12.50. Aldonu sendokojn: fr. 1.50. Ĉiujn novaĵojn ni liveras (neuzitajn), je nominala valoro + 5% + fr. 1.50. Petu prezojn de aliaj belaj poŝm. Adreso: Van Ooyen & Co., Lange Pothoekstraat 86, Antwerpen (Belgio). [2]
REPREZENTADO. Droĝisto, korespondanta ruse, hebree, rumane, deziras esti reprezentanto de grandfirmaj de artikoloj drogaj, parfumaj, porĉefaj, elektroteknikaj k. a. Antaŭ la milito li havis grandan klientaron, preĉipe en Besarabio. Adreso: s-o Saul Haham, droĝisto, en Cauŝani-Noi (jud. Tighina, Besarabio), Rumanujo. [2]
MORTO. En Budapest mortis la 26. 6. 1924 f-lino Mario Schmulc. [1]
ADRESO-ŜANĜO. S-o Friedrich Gerstner, antaŭe en Karlsruhe-Rippurr (Germani), sian novan adreson: Friedrich Gerstner, ĉe Fazekas, Pauler ul. 21., Budapest 1, Hungarlando. [1]

Korespondado kaj intersaĝo.

Iljan edziĝon scigas al samideanoj A. A. Anton Ehm, del. U. E. A. kaj edzino Charlotte, naskita Köhler, Zittau, Stefanstr. 11, la 5. 7. 1924. [1]
S-o Debarhier Guglielmo, Via Casaregia 55, Genova, Italujo, deziras intersaĝi PM kun la tuta mondo. Preferas: Svislando, Svedujo, Turkujo, Francujo, Norvegujo, Hispanujo kaj Portugalujo. [2]
S-o Francisko Schwarcz, Sobinovska ul. 35, Prešov, Ĉeĥoslovakio, deziras serioze korespondi kun ĉiulandaj efektive veraj kaj insistaj Esperantistoj eventuale preferu kun s-inoj. La temon de la korespondado oni povas reciproke fiksi. Certa respondado. [2]
S-o Francisko Dudas, policoŝefito, Szerb ul. 5. Budapest, Hungarujo, deziras ricevi 100-200 poŝmarkojn neporŝitajn kaj sendifektajn intersaĝe. [2]
S-o L. A. De Greef, 28 rue Hayettes, Lodelinsart, Belgujo, deziras korespondi per il. PK kaj L kaj intersaĝi nacian gazetojn kaj PM kun la tuta mondo. [3]
S-o Serdjukov A. J., poŝt. asikŝi. 51, Astrahan, Rusujo, deziras korespondi pri pentratio. Ĉiam respondos. [1]
S-o Wilhelm Cremer, insektoro, Benrath, Rheinland, Markt play 4, Germanujo, deziras intersaĝi il. PK, kun gesamideanoj de la tuta mondo. Tuj respondos. [1]
S-o Nelson kaj s-ino Olga Johansson, Strand, Svedujo, deziras korespondi kun popoloj instruistoj, preĉipe hinoj, japanoj kaj hindoj per il. PK [1]
Tra la mondo. Esperanta grupo Nieder Salzbunn deziras korespondi kun gesesperantistoj de la tuta mondo. Ni certe respondos al ĉiuj. Bonvolu skribi al s-o Fritz Kinner, Nieder Salzbunn, Poststr. 5, Schlesien, Germanujo. [1]

Aĉeteblaj dum la Deksesa en Wien

Aperis tradukite de Henrico Seppik iri altmilvaj verkoj de estona plej bona novelisto Friedebert Tuglas.

Novelaro: 175 paĝoj. Kun portreto de la aŭtoro kaj artikolo de ir tradukinto pri la estona beletristiko. Fundamenta prezo: 3,5 sv. fk.

Noveloj: 175 paĝoj. Kun portreto de la aŭtoro kaj artikolo de ir tradukinto pri la estona beletristiko. Fundamenta prezo: 3,5 sv. fk.

En la fino de la mondo. 56 paĝoj. Prezo: 1 sv. fk.
Popi kaj Huhu. 52 paĝoj. Prezo: 0,50 sv. fk.
Aria iraduko. Bela eksteraĵo. Luksa papero. Placa arango.
Por sendokoj aldonu: Latvoj kaj Litovoj 50% aliaj landoj 100%.



Eldonejo M. Tamverk

Esperanto-fako.
Karja str. 5, Haapsalu, Estonio.

La plej malmultekosta libro en Esperanto

Ĉiu devas nepre posedi la libron

Eŭropo ĉe la abismo

de

Francesco Nitti

iama ministrara prezidanto itala

Esperanto-traduko

kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.

(Preŝkal 200 paĝoj.)
Prezo 4 sv. fk.
Mendu tuj!

La libro al privatpersonoj okazos nur post antaŭa pago de la sumo de 4 sv. fk. plus sendokoj de 25 centimoj po ekzemplero, pogebla en la valuto de la konkerna lando, transalkulite je la kurso de la borsjo de Zürich (Revendistoj turnu sin pro specialaj kondiĉoj al la eldonejo)

Havebla en la kongreslibrejo de l' Deksesa.

Skribajn mendojn adresu al:

Frankfurter Societ'as-Druckerei
G. m. b. H.
Abtlg. Buchverlag - Frankfurt a. M.
Korespondado en Esperanto. —: Ilustritaj kartoj rifuzataj.

Persujo! Oriento!

Se vi deziras rilatojn kun la tuta mondo kaj speciale kun Persujo kaj la Oriento alĝu tuj al la

Internacia Koresponda kaj Interŝanga Societo „Iran“.

Propra organo en lingvoj franca, angla, persa kaj en Esperanto.

Jara kotizo 5 sv. fk.

Skribu en Esperanto al:

s-o N. Falsafi, Teheran, Persujo.

Ĉiu esperantisto, kiu interesiĝas pri la politikaj problemoj de Eŭropo devas legi la aktualan libron:

La Sendanĝereco de Francujo

(„La Sécurité de la France“)

de s-o André Honorat.

Senatano, eksministro de Publika Instruado en Francujo.

Jus aperinta.

Eldono honorigita de apogo de la Paris-a Komerca Cambro kaj de la Respublikana Komitato de Komercio kaj Industrio.

Volumo de ĉirkaŭ 160 paĝoj kun aparta antaŭparolo de la aŭtoro.

Kolektiva

traduko kontrolita de s-o Grosjean-Maupin.

La prezo de la volumo nur 5 fr.fk. + 0.50 por sendelspezoj.

Ĉefa Deponejo:

Centra Librejo Esperantista,
51, rue de Clichy, Paris 9e.

La Batalanto

Eldonejo

Hannover, Bürgermeister Fink-str. 19.

Al eterna paco

de Imanuel Kant

Tradukita de la fame konata tradukisto Prof. P. Christaller.

Prezo: 2. — ormarkoj (2,80 sv. fk.)
Sendkostoj 10%.

Jus aperis:

Batalantoj por la homarapaco

de D-o Winfried Fricke.

Prezo: 25 fenigoj. Sendkostoj: 5 fenigoj.
Por progandaj celoj: 25 ekz.: 5.50 or-mk.;
50 ekz.: 11. — or-mk.; 100 ekz.: 21. — or-mk.

Bonvolu pagi en rekomendita letero en or-mk. aŭ egalvaloro en alia valuto.

Dum la Deksesa haveblaj en la kongreslibrejo.

„Esperantista Junularo“

Organo de UEA-Junularo — bela por infana literaturo — internacia lernejo-servo. Abonprezo po numero 1/4 afranko de letero por eksterlando (jare 8 n-oj).

Administracio: A. Neupert,
Wedellstr. 17 - Leigzig-Möckern, Germ.



Nordlandaj kongresanoj

vizitu la

Svedan

Specimenan Foiron

en Malmoe

Svedujo

4—10 aŭgusto 1924

XVI-a Kongreso de Esperanto, Wien.

Dum la Kongreso okazos **Publika parolado** pri la temo:

Ĉiuj nacioj ekmarŝontaj al Har-Magedon!

Paroladisto: Alfred Egg, Rieden bei Baden, Svislando, sendito de la Internacia Asocio de Biblio-Studentoj kaj de la Garda Turo, Biblio- kaj Traktat-Societo, Brooklyn, Usono.

Ĝi temas pri la vera signifo de la nuntempa kriza stato de la mondo kaj okazos je sabato, la 9 aŭgusto 1924, 9.15 horo, en la ĉambro de la „Apotheker-Genossenschaft“ (Apoiektista Kooperativo), Spitalgasse 31, 1-a etaĝo, Wien, distrikto IX, ne malproksime de la Kongresejo.

Eniro senpaga.

Eniro senpaga.

La mondo hodiaŭ troviĝas en la plej granda krizo de ĉiuj tempoj kaj la homa civilizacio estas minacata de kompleta dissolvigo en anarĥion. La popoloj estas en kreskanta aflikto kaj senkonsiligo. La blinda frezo de rapidega militpreto, kiu detruas ĉion, ekkaptis ĉiujn naciojn kaj ĉie estas preiĝataj plenvalaj produktadoj de nia „kristana kulturo“, satanaĵo batalilo de plej egaj terureco kaj detru-povo en plej granda amplekso por nova amasa mortigado. Reciproka suspekto, malamikeco, malpacemo, aflikto, kolerigo, malespero kaj sangvida furiozo de la popoloj kaj klasoj plimultiĝas kaj laŭ katastrofo de nepriskribebla terureco kuntrifas super la homaro nigre kaj fulmiondropeze.

Ĉiuj nacioj kaj popolklasoj koncentrigas siajn batalfortojn je decida giganta finbatalo kaj estas nuntempe en ekmarŝo al la granda batalo de Har-Magedon, antaŭdirita de la profetoj de Dio en la Biblio (Apokalipso 16: 16). Tamen la plejpotenca mallongigos ĉiun ĉi lastan teruran finbatalon de ĉiuj kontraŭ ĉiuj, tiel, ke milionoj da homoj nun vivantaj transvivos ĉiun ĉi afliktegon kaj neniam mortos en la Regno de Dio, kiu estas starigota sur la ruinoj de la malnova monda ordo.

Ni invitas la kongresanojn

ĉeesti ĉiun publikan paroladon en Wien en granda nombro por aŭdi la averton, kiu nuntempe estas proklamata de Biblio-Studentoj en la tuta mondo kaj en multaj lingvoj. Spite eventuala mal-simpatia kaj nekredemo kontraŭ la proklamo veni; ĉar kiam vi vidos ĉion plenumi kiel ĝin antaŭdiras la Biblio: sed se vi enkonvena tempo ne volis aŭdi, vi pentos pri via fliama neinformiteco!

Koran inviton al ĉiuj!

Garda Turo, Biblio- kaj Traktat-Societo

Centra Oficejo en Brooklyn, Usono,

Esperanta Fako, Rieden bei Baden, Argovio, Svislando.

Al la lando de la 1000 insuloj!

Dua Sudslava Kongreso Split sub protekto de l' urbestro. — Subvencio 2500dinaroj. 50% rabato sur la fervojoj kaj vaporŝipoj en Jugoslavio dum tuta monato.

Al la esperantistaro.

Saluton kaj sukceson al vi en la Deksesa en Wien!

Serĉa posikongresan ripozon sur la ondkaresata orienta marbordo de Adriatiko kaj honorigu nian II-an naciian kongreson per via tre valora vizito, kiu ne nur donos okazon al vi vidi

struaĵoj, bibliotekoj, maŭzoleo kaj galerioj. Split ankoraŭ hodiaŭ fieras je tiuj ĉefverkoj de la antikva konstruista arto.

La arkeologia muzeo en Split estas unu el la plej riĉaj en Eŭropo, ĝia eminenta direktoro D-o hon. causa Franc Bulić estas fame konata en la tuta arkeologia mondo. Ne malpli interesa estas la etnografia muzeo, unu el la plej belaj en Jugoslavio.

La kongresaj ekskursoj.

Trogir. Tiu ĉi originala 2000 jara urbeto portas ĉie la signojn de la Venezia regado. La urbo kuŝas parte sur la kontinento, parte sur la insulo Ciovo. Ambaŭ partojn kunligas malfermebla ponto. Vidindaĵoj: la placo kun la katedralo de la XIII. jarcento. Pomplena vestiblo, riĉa romana ĉefportalo kaj tre bela turo.



Makarska kun banejo.

la perlojn de niaj naturbelajoj, sed ebligas al vi ankaŭ konvinkigi pri la forta sento de niaj koroj.

Dank' al la tre ŝatata komplezemo de la redaktoroj de ET ni havas la honoron prezenti al vi nur malgrandan parton de niaj vidindaĵoj, allogantaj ĉiujn centimiojn da fremduloj kiu povos resti, tiu mal-kovros centon da aliaj naturmirakloj sur nia Adriatiko.

Ne hezitu, karaj gesamideanoj, venu grandare kaj helpu per via ŝatinda ĉeesto nian propagandon!

Ĝis la revido en Split!

Esperania Klubo, Split.
Kongresia Komitato.

Nia devo estas ĉi tie danki la ĝeneralan sekretario de la societo "Jadranska Straza" en Split s-on Prof. Silvijo Alfirević kaj la direktoron de "Turista Oficejo" en Split s-on Jerko Culić por la tre afable disponigitaj klišoj.

La urbo de la II-a Sudslava Esperanto-Kongreso.

La tradicio rakontas, ke la imperiestro Diokleciano, antaŭ ol abdiĝi je la Roma trono, esitis dissendinta tra la tuta imperio siajn plej famajn kuracistojn kaj inĝenierojn, por ke ili trovu al la lacigita imperiestro belan, sanan kaj agrablan lokon, kie li amuzus, ripozus, ĉasus, kaptus fiŝojn, ĝardenistus, ŝipveturus, banus kaj sunlumus en la poeta ĉirkaŭpreno de la naturaj belecoj. La kuracistoj kaj inĝenieroj trakuris la kvar mondpartojn kaj elektis por sia imperiestro ĉarman margolton, ses kilometrojn apud Salona, la tiama ĉefurbo sur la orienta marbordo de Adriatiko. La grekaj konstruistoj starigis tie pompan imperiestran palacon kun belegaj kon-

La mondfama sulfa fonto de Split estas konata ankoraŭ de la tempo de la supre nomita imperiestro Diokleciano. Ĝi estas la plej bona minerala sulfur-radio-joda-broma saniga akvo en Eŭropo. Ĝia fonto donas en 24 horoj


Kaŝtela. Laŭlonge de la ŝoseo Trogir-Split ĉarme lokita sur la marbordo de sep kaŝteloj, konstruita sisteme kontraŭ la turkoj, Vinberoj, agavoj, oliv- kaj figarboj.

* **Solin.** La ruinoj de antikva Salona laŭ sia abundeco kaj vidindeco troviĝas en la dua vico post Romo, Ateno, Pompejo kaj Herkulano. La restoj de la grandiozaj muregoj, amfiteatro, preĝejoj, valoregaj arkitekturaj fragmentoj, sarkofagoj, skulptaĵoj, senkomparaj mozaikoj pravas la altgradan kulturon de la antikva ĉefurbo.

* **La blua groto sur la insulo Biŝevo.** En la mezo de la lazura Adriatiko karesata senĉese de la maro kuŝas la insulo de la grotoj vidalvide de ĉarma 9 km malproksima loketo Komiza sur la fama insulo Vis (Lissa). En la IX. jarcento sur Biŝevo loĝis la monaĥoj de St. Benedikto; hodiaŭ ĝi hejmgigas 300 fiŝkaptistojn.

La plumo ne kapablas priskribi la belaĵojn de tiu fina templo. Tie koncentriĝis la tuta mara perlaro, ĉiuj koraloj kaj ĉiuj florkoloroj. Enirante vi ekrigardas belagan tapiŝon el violkolora veluro kun perloj kaj juveloj. Antaŭenirante vi renkontas fanditan arĝenton sub via boato. Je remiltrempo eksaltas mil fajreroj, oraj kaj arĝentaj fiŝoj ĉirkaŭnaĝas vin kaj vi ravile admiregas la sorĉajn belaĵojn de la lazurverdaj nuancoj.

* **Vis.** La insulo de la palmoj kaj oranĝoj estas malproksime konata pro ĝia fruktodoneco kaj eksterordinare milda klimato, al kiu ankaŭ la fama Vis'a ruĝa vino dankas sian bonguston. (Ĉi tie okazos la komuna tagmanĝo okaze de



Kaŝtela apud Split (el groto sur monto Kozjak).

ĉirkaŭ 2 milionojn da litroj. Prospektoj haveblaj de la Turista Oficejo en Split. — ET n-o 189 jam vidigis la belegan panoramon de la urbo.

malproksime konata pro ĝia fruktodoneco kaj eksterordinare milda klimato, al kiu ankaŭ la fama Vis'a ruĝa vino dankas sian bonguston. (Ĉi tie okazos la komuna tagmanĝo okaze de

la ekskurso al Biŝevo.) Sur la okcidenta flanko de la insulo urbeto Komiza, mondkonata pro sia sardel-industrio.

Hvar. (Lesina), la sudslava Madeira, estas bone konata al multaj nordlandanoj pro sia mildega saniga klimato. Ĝia mezmalsekvarma klimato tre similas al tiu de Ajaccio, Palermo, Catania kaj Korfu. Meza vintra temperaturo 10.6°. Belegaj parkoj kaj marbordaj promenejoj. Famaj antikvaj monumentoj kaj pentraĵoj (precipe de italaj artistoj). Per ĝia ŝtono estas konstruita la parlamentejo en Berlino. Speciala industrio: punktoj el agavoj. (Dum la ekskurso al Biŝevo oni vespermanĝos ĉi-tie.)

Korĉula („Corcyra nigra“ de la romanoj), antikva urbo sur la samnoma insulo. Interesplenaj fortikaĵoj. Multaj domoj kaj palacoj en malnova Venezia stilo. Mallarĝa markolo dividas ĝin de la bonege esperantigita duoninsulo Pelješac (ĉefloko: Janjina).

Dubrovnik (Ragusa), la plej bela kaj interesa urbo en Dalmacio, ne nur pro sia lokigo kaj ĉirkaŭaĵoj, sed ankaŭ pro la tre interesaj mezepokaj historiaj vidindaĵoj kiel ankaŭ pro la ĉarmeco de la naciaj kostumoj. Vidindaj la bastionoj, la monaĥejoj, la rektora palaco (konstruita 1462 de Onofrio de la Cava), la pentraĵoj en la katedralo (de Ticiano, Dordenone, del Sarto).

Kotor (Cattaro) kun la fama margolfo inter altaj montoj. Tre interesa naturvidindaĵo. Suprenramo de Lovĉen (Montenegro) rekomendinda. Carmoplana panoramo.

Esperanto en Dalmacio.

Jam komence de la nuna jarcento troviĝas en Dalmacio la unuaj provoj de Esperanto. En Split s-o Carlo Petronio, en Dubrovnik s-oj Niko Mirosĉević, Sorgo kaj R. Rupčić, en Janjina s-o D. Bacelli povas esti konsiderataj la unuaj pioniroj en nia ĉarma vasthorizontala lando. Kiel ĉie tiel ankaŭ ĉe ni post longaj klopodoj oni sukcesis venki la indiferentemon de la publiko, la danĝerajn antaŭjuĝojn kaj la obstinan malamikaron.

Nur la jaro 1920 post la kunveno de s-oj Borčić kaj Rupčić en Split promesis pli bonan ekmarŝon. Post prepara periodo fondiĝis en aprilo 1922 la unua Esperanta Klubo en Split, kiu baldaŭ fariĝis la centro de la movado en Dalmacio. Por la propagando komencis intertempe zorgi ankaŭ la novaj kluboj en Janjina kaj Dubrovnik. Malfacile estas en kelkaj linioj priskribi la grandan

laboron de tiuj 3 kluboj: paroladoj, kursoj, ekspozicioj, cirkuleroj, artikoloj, kunvenoj kaj festoj.

La dua kongreso de sudslavaj esperantistoj en Split (ĉefurbo de Dalmacio) estas la krono de la diligenta laborado kaj preparado de niaj samideanoj. Eĉ la plej malproksimaj vilaĝetoj konas la ideon de Esperanto, fervoraj apostoloj buŝe kaj skribe ne laciĝas dissemi ĝin.

En- kaj eksterlandanoj ne preterlasu viziti la landon de la mil insuloj kun ĝiaj grotoj kaj rifoj.


Venu kaj uzu la tre favorajn kondiĉojn de la vojaĝo!

Informoj riceveblaj ĉe D-o Dušan Maruzzi el Zagreb, Wien, (adreso de l' kongreso), kiu

Dum la kongreso kaj ekskursoj komunaj tagkaj vespermanĝoj. En la akceptejoj ĉiu kongresano ricevos la adreson de sia loĝejo, kongresajn insignon kaj programon.

La urbestro D-o Ivo Tartaglia fariĝis honora projektanto. La fervojoj kaj vaporŝipoj en Jugoslavio konsentis al ĉiuj kongresanoj (do ankaŭ al eksterlandanoj) 50% rabaton por la daŭro de 9.8 ĝis 8. 9. 1924. Bonega okazo por ripozoj sur nia marbordo tutan monaton.

La urbestro donacis al la lia monsubvencio de 2500 dinaroj.



Komiza sur insulo Vis.

Do, neni samideano preterlasu la favoran okazon por viziti kaj admiru, post la Deksesa en Wien, la

belan landon de l' maro, suno kaj del' mil insuloj: DALMACIO!

ĉeestos la XVIan kaj faros tie inviton aliĝi al nia nacia kongreso en Split.

Provizora programo de la Dua Sudslava en Split.

Vendredo 22. 8. Alveno de la kongresanoj. Interkonata ĝia vespero.

Al Wien.


Lastminute ricevitaĵaj informoj!

Kongresa fakkonferenco de tabak kontraŭuloj.

Tiu ĉi kunveno okazos lunde la 11 aŭgusto je la 5 h. posttagmeze en la sekretariejo de la ligo de aŭstriaĵaj tabak kontraŭuloj, grupo Wien, I. Kleeblattgasse 7/II.

Tagordo:

1. la kontraŭtabaka kaj la Esperanto movadoj,
2. fondo de Esperantista tabakkontraŭula asocio (ETKA); statutoj, estraro ktp.,
3. diskuto pri propagando kaj literaturo. Esperantlingva flugfolio aperas.



Jabuka, la plej malproksima insuleto en Adriatiko.

Sabato 23. 8. Solena malfermo de la Dua en la Nacia Teatro. Komuna fotografado. Laborakunsido. Amuzovespero.

Dimanĉo 24. 8. Laborakunsido. Vaporŝipe al Trogir, Kaŝtela, Solin.

Lundo 25. 8. Vaporŝipe al Biŝevo, Vis, Komiza, Hvar, Dubrovnik, Kotor.

La Internacia Kongreso Katolika de Ika okazas en Lugano.

La Internacia Kongreso de Internacio Katolika (Ika),

preparita por la 15-20 aŭgusto por Venezia, pro la nunaj cirkonstancoj okazos en

Lugano, Svislando, la 15-20 aŭgusto.

La programo estas neŝanĝata. Katolikaj samideanoj ĉiulandaj estas kore invitataj. Informojn donas Ika, Zug, Svislando.